

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Protektantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank- kaj fabrik-
direktoro, Kaunas.

N-o 162
21. 10. 1923

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung
M. Butin, L. K.

Administracio:

(Preciza poŝtadreso)
Esperanto Triumfonta
Horrem bei Köln, Germanlando.

Tarifon

vidu sur speciala folio, kiu estas aldon-
ata al ĉiu specimena kaj unua numero
de nova abono.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

CENTRA ESPERANTO-KOMITATO
Centra Kaso.

10. Oktobro 1923.

Alvoko al la Esperantistaro.

Financa subteno estas urĝe bezonata por la oficialaj institucioj de la Esperantistaro, nome:

Lingva Komitato (L. K.) kun ĝia Akademio;
Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj
Societoj (K. R.);

Universala Esperanto-Asocio (UEA) kun
ĝia Komitato; kaj

Centra Esperanto-Komitato (C. K.) kun
ĝia Konstanta Kongresa Komisiono
(K. K. K.).

La C. K., kiu zorgas pri la ĝeneralaj interesoj de la Esperanto-movado, starigis Centran Kason, kiu enspezas donacojn, kotizojn de kongresoj, kotizojn de naciaj societoj pere de la K. R., kaj subvenciojn de UEA.

La C. K. petas al la bonvolaj Esperantistoj, ke ili tuj per siaj donacoj provizu por la Centra Kaso sufiĉe da monrimedoj por ĝenerala propagando, por la subteno de la Lingva Komitato kaj la Centra Oficejo en Parizo, kaj por certigi, ke la nova organizo de la Centraj Institucioj havu bonan kapitalon por komenci fruktodonan laboron.

De nun la respondeco por la subteno de la Centraj Institucioj restas ĉe la Esperantista popolo. Do, kiu povas, tiu donu al la Centra Kaso. Eĉ la plei malriĉa ne detenu sin. Multaj etoj fariĝas egoj. La grupoj bonvolu organizi periodajn monokolektojn. La naciaj societoj sendu monon al s-o Edmonds, kasisto de la K. R. En la malbonvalutaj landoj oni aĉetu dolarojn aŭ britajn monbiletojn. Bonfaremaj bonhavuloj dediĉu ĵarajn sumojn al la kaso. Tiuj kiuj tion deziras, rajtas direktil, ke mono sendita estu uzata por L. K., Generala Propagando, Centra Oficejo en Parizo, UEA ktp. Se direkto mankas, la Centra Komitato metos la monon en la Centran Kason kaj ĝin dispartigos inter la Oficialaj Institucioj laŭbezone.

Samideanoj, la Oficialaj Institucioj, kiujn vi kreis, ne povas funkcii nur per bonvolo. La Centra Komitato ja bezonas bonvolon, sed ĝi ankaŭ bezonas viajn monoferojn. Ni atendas ilin.

Por la Centra Esperanto-Komitato:

W. M. Page, financa fakestro.
51, Queen Street, Edinburgh.

Aliaj gazetoj bonvolu represi kaj traduki nacilingven.

Kelkaj notoj

Pri la III-a internacia blindul-esperantista kongreso en Nürnberg (2.-8. aŭgusto 1923).

(Malfruigite sendita.)

La III-a internacia blindul-Esperantista kongreso nun apartenas al la estinto, sed ŝajnas al ni, ke ni aŭdas multvoĉan demandon ankaŭ el rondoj de la legataro de ET: „nu, do, kio okazis en Nürnberg, kion faris la blinduloj en la III-a kongreso?“ Niaj vidantaj amikoj vere rajtas ion sciigi pri la kongreslaboroj de la blindaj Esperantistoj, kiujn ili tiom malavare mونسubtenis, kaj volonte ni plenumas tiun ĉi ilian deziron koncize raportante pri la ĉefaj detaloj.

La blindulkongreson parolprenis 93 blinduloj kaj 27 viduloj, kiuj kune reprezentis 13 naciojn. La kunsidoj havis lokon en la Nürnberg-a blindulinstituto kiu, dank' al ĝia direktoro, nia eminenta samideano, s-o Wilhelm Reiner, tute estis je nia dispono tiamaniere, ke la plei multaj kongresanoj povis logi kaj mangi tie, grandega avantaĝo por la blinduloj!

En la malferma kunsido ne nur salutparolis naciaj reprezentantoj, sed ankaŭ oficialaj reprezentantoj de diversnaciaj grandaj blindulorganizacioj. Viciprezidanto s-o profesoro Stanislas Štejskal, unu el niaj plej eminentaj tifflofiloj, sa-

lutis je la nomo de la ĉeĥoslovaka registaro kaj s-o blindulinstruisto Inte Čače, nia unua kongressekretario, laŭ komisiono de laŭ labora ministerio.

La blindulkongresa komitato aranĝis kvar bone vizitajn laborkunsidojn, en kiuj oni ne nur akceptis kaj diskutis proponojn aŭ solvis gravajn demandojn, sed ankaŭ havis okazon aŭdi multajn bonegajn referatojn pri la stato de la blindula movado en la diversaj landoj aŭ pri aliaj interesaj temoj koncernantaj la blindularon. El la faritaj kaj legitaj referatoj ni citas jenajn: Prof. St. Štejskal, „La Progreso de la blindula movado en Ĉeĥoslovakio dum la lastaj du jaroj“; „Raporto pri la laboroj de la internacia informo kaj statistikejo en Praha“; Paul Krüger, „La blindulo en la germana metalindustrio“; Hermine Gotthard, „La kondukanta hundo kaj ĝia dresado“; Victor Hendrickx, „Raporto pri la blindulsekio de la internacia ekspozicio pri militvunditoj en Gent“; Teresie Rackova, „Feliĉa vivo inter blindaj amikoj kaj geedzoj“.

Kiel atesto de sukcesplena kongreslaboro servu la fakto, ke la blinduloj fondis tri gravajn internaciajn organizaciojn, kiuj sendube estos la komenco de nova epoko en la historio de Esp. inter blinduloj. La unua kaj ĉefa el la fonditaj organizacioj estas la „Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj“ mallongigite Uabe. Uabe celas: a) unuigi la diversnaciajn blindulojn en frataj kaj komune interesaj rilatoj; b) disvastigi Esperanton kiel unuigilon inter la tutmonda blindularo kaj c) reprezenti la blindulojn eksteren. Esperable la tutmonda Esperantistaro komprenos niajn klopodojn kaj laŭpove helpos nin, por ke ni atingu nian celon. En speciala artikolo ni poste preparos tiun aferon kaj hodiaŭ nur sciigos tiom, ke ĉiu Esperantisto aŭ Esp. institucio kaj organizacio povas aliĝi al Uabe kiel subtenanta, helpanta aŭ donacanta ano. Ni ankoraŭ ne fiksas diverskategoriajn kotizojn, pro kio ĉiu aliĝonto povas pagi laŭvolan kotizon por la unua jaro. Bonvolu sendi aliĝojn kaj memvolajn kotizojn por „Uabe“ al la subskribinto, kiu provizore prezidas la asocion. La dua nove estigita organizacio estas la „Internacia Asocio de blindaj muzikistoj kaj muzikamatoroj“. Trie la kongreso fondis „Konstantan Blindulkongresan Komitaton“, kiu kune kun la lokaj blindulkongresaj komitatoj de nun organizos la venontajn blindul-esperantistajn kongresojn. Plue la III-a elektis komisionon, kiu preparos la statutojn por la proksimjare fondota Internacia Asocio de blindaj metiistoj, kies ĉefa tasko estos la starigo de internacia material-vendejo por blinduloj.

Ne trograndigante, oni povas diri, ke la III-a estis unu el la plej sukcesplenaj blindulkongresoj iam okazintaj. Denove ĝi klare pruvis la utilecon de Esp. speciale por blinduloj. Uzante la okazon, ni esprimas nian tukuron dankon al ĉiuj, kiuj monhelpis nian III-an tiamaniere, ke ni povis senpage gastigi multajn malriĉajn diversnaciajn nevidantojn. Specialan dankon ni ŝuldas al niaj tifflofiloj s-o Direktoro Reiner, Nürnberg, s-o Prof. Stanislas Štejskal, Praha, s-o Blindulinstruisto Inte Čače, Riga kaj f-ino Hermine Gotthard, Braunschweig, kiuj rezignante al la ĝuoj kaj plezuroj de la XV-a, dediĉis sian tutan tempon kaj energion al la blindulkongreso. Iru kaj faru la samon, mi alvokas al ĉiu vidanta Esperantisto. Fianta, mi ne volas forgesi rememorigi pri la financa mizero de „Esperanta Ligilo“, kiu nun fariĝis oficiala organo de „Uabe“. Mondonacojn por E. L. akceptas la redakcio de ET.

Joseph Kreutz, Kreuzau b. Düren, Rheinl., Germ.
Prezidanto de la III-a Internacia Blindul-esperantista Kongreso.
Prezidanto de „Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj“ (Uabe).

Subtenu la oficialajn instituciojn!
Kiu rapide donas, tiu donas duoble.

Raporto

pri la publikaj paroladoj de la Internacia Asocio de Biblio-Studentoj dum la XV-a Universala Kongreso de Esperanto en Nürnberg 1923.

(Malfruigite sendita.)

La prezidanto de la Internacia Asocio de Biblio-Studentoj, kun sidejo en Brooklyn, Usono, sendis du delegitojn al la Kongreso por okazigi paroladojn. — La asocio, kiu havas lokajn grupojn en preskaŭ ĉiuj urboj de la mondo, estas fondita kun la celo, libere esplori la Sanktan Skribon kaj prosperigi kristanan scion per eldonaĵoj kaj publikaj paroladoj. Ekkoninte Esperanton kiel signon de la tempo, la prezidanto de la asocio favoras Esperanton kaj pere de ĝi intencas okazigi paroladojn kaj tradukigi la eldonaĵojn de la asocio. —

Tial la 2. de aŭgusto estis disdonataj al la kongresanoj la traktato „Proklamo“, kiu estas grava alvoko al la eminentuloj de la mondo kaj enhavas rezolucion, kiun kunvenego de la nomita asocio unuanime aprobis kaj kies esenco estas la esprimo de la konvinko, ke la mondo troviĝas en turnopunkto de la homa historio kaj ke la Regno, pri kiu kristanoj preĝis dum pli ol 1800 jaroj, sekvos la nunajn mizerajn cirkonstancojn en la mondo kaj aligos la teron en staton perfektan por la homaro.

Samtempe estas disdonita invito al du publikaj paroladoj de la senditoj de la Internacia Asocio de Biblio-Studentoj.

La unua parolado okazis la 3. aŭgusto, je 16.30 h., en ĉambrego de la „Lehrerheim“. Paroladisto estis Kaarlo Harteva, inĝeniero kaj samtempe gvidanto de la finlanda sekcio de la asocio, el Helsinko; li parolis pri la temo: „La nova mondo komenciĝas — Miliono, kiuj nun vivas, neniam mortos!“ Post akcenta prelegado de la Esperanta himno: „La Espero“, li klarigis en mallongaj trajtoj la faktajn esperojn, kiujn povas havi hodiaŭ la homaro, dirante, ke laŭ profetaĵoj de la Sanktaj Skriboj nun alvenis la tempo, en kiu per afliktego malaperos la malnova, jam tute ne taŭga monda ordo sur la tero kaj ke tiu ĉi mizera nuna stato estos sekvata per tio, al kio la homaro pli malpli klare sopiras, t. e. feliĉaj, perfektaj cirkonstancoj sur nia tero, kiu aliformiĝos je paradizo; kaj vivo eterna sen iaj ajn signoj de mankoj, malfeliĉo kaj ĉagreno, la ora epoko de la homaro, kiam regos reciproka amo de unu al la alia kaj al la Kreinto. —

En ĉambro de sama domo la 6. aŭgusto, matene je la 9.30, estas aranĝita la dua parolado, kies titolo estis: „La dia plano de la epoko“. Kiel helpilo por la klarigoj de la paroladisto, Alfred Egg, el Baden, Svislando, servis Esperantlingve verkita markarto. La paroladisto montris kaj klarigis la diversajn tempospacojn de la Plano de Dio, ekkonebla per la libroj de la Biblio, la Vorto de Dio. Tiuj ĉi epokoj estas: la

1. kiu komenciĝis per la kreo de la homo kaj finiĝis per la diluvo,
2. kalkuliĝinta de la diluvo ĝis la ekstarigo de la profeta Regno de Kristo. Tiu ĉi epoko estas subdividita en tri partojn:
 - a) la patriarka mondepoko
 - b) la juda, kaj
 - c) la evangelia mondepoko.
3. distingiĝinta per la ekstarigo de la Krista Regno miljara kaj la sekvontaj gloraj tempoj de la reperfektiĝinta homaro.

Ambaŭ paroladoj estas komencitaj kaj finigitaj per kantoj kaj preĝoj. Post ĉiu kunveno estas vendata la libro: „Miliono, kiuj nun vivas, neniam mortos“, la unua Esperanten tradukita verko de la asocio.

Je la fino de la paroladoj kaj en la kongresego plue estis disdonataj mendiloj por specimeno aŭ abono de la ĵurnalo „La Ora Epoko“, kiun la

asocio nun aperigas en Esperanta lingvo. Tiu ĉi ĵurnalo estas bazita je fakto, espero kaj konvinko kaj eldonita depost 1920 jam en diversaj lingvoj. Ĝi ampleksas laŭ ĝia senco kaj enhavo ĉiujn sferojn de homa scio kaj en verco parolas al la homaro. En nepra senparteco ĝi ankaŭ pritraktas la Vorlon de Dio, la Bibliion.

La subskribinta raportinto estas preta, doni ĉiujn dezireblajn informojn pri la asocio kaj la temoj, pritraktitaj dum nia XV-a.

Por la asocio:

Alfred Egg, Rieden bei Baden,
Landstrasse 277, Aargau, Svislando.

Rezolucio

de la kursgvidantoj dum la XV-a.

Kompara ankaŭ ET 159, Parolejo 209.

„Ne faru kursojn sen pago!“ antaŭ ĉio rilatas al la kursanoj. La partoprenantoj de la faka kunveno en Nürnberg elparolis unuanime, ke senpagaj kursoj por la kursanoj ne estas rekomendindaj, ĉar la lernfervoro de la kursanoj ofte dependas nur de la pago. Se la kursanoj ne devas pagi por la kurso, multaj el ili ofte malsatas la tutan aferon, ĉar ili pensas ke, se tio estas senpaga, tio ne povas multe taŭgi, alie oni ne altrudus ĝin senpaga. Nur malmultaj ekkonas la utilecon de Esperanto kaj lernas fervore, ankaŭ se ili ne estas kvazaŭ devigataj per pago. Eĉ de la malriĉaj kursanoj oni postulu pagon kaj eventuale la fino de la kurso oni redonu la manon aŭ parte aŭ eĉ tute, se la kursano diligente lernas. Memkompreneble, la postulo, ke la kursanoj pagu, povas rilati nur al la klubaj kursoj, ĉar por la lernantoj en la lernejoj ekzistas tute aliaj disciplinoj ol la monpago, por pligrandigi la fervoron kaj la intereson por Esperanto.

Cu la postulo: „ne faru kursojn sen pago“ ankaŭ rilatas al la kursgvidantoj, tio dependas tute de la cirkonstancoj, sub kiuj la kurso efektiviĝas kaj okazas. Certe estus dezirinde, ke la kursgvidantoj ĉiam estu pagataj laŭ siaj penoj, ĉar tiamaniere la laboro de la kursgvidantoj ofte estus pli bone plilavita, sed tiam ankaŭ la aranĝantoj de la kurso rajtus, postuli sinceran kaj solidan laboron de la kursgvidanto.

Sed ĝuste la financa demando plej ofte estas la „kialo“ de la kursokazo. Certe, ekzistas inter la Esperantistoj ankoraŭ sufiĉe da idealistoj, kiuj, ne konsiderante la penojn, tempordan kaj eĉ kostojn, instruas nur el pura amo por Esperanto kaj eĉ tre sincere kaj solide laboras, ofte pli bone, ol iu bone pagata kursgvidanto. Sed bedaŭrinde estas nur malmultaj esceptoj. Fine, oni ne rajtas, proĉi iun, se li ne povas aŭ ne volas senpaga instrui, ĉar precipe la nuna malfacila tempo kun ĉiuj ĝiaj mizeroj estas tre malfavora kaj malhelpa al la idealismo.

Plue oni rekomendas, ne faru kursojn kun tro multaj partoprenantoj, por ke la instruaro fariĝu pli fruktodona. Sed tiaj malgrandaj kursoj plej malfavoras influas la financon demandojn, ĉar: malmultaj partoprenantoj havigas malgrandajn enspezojn kaj la pago por la kurso ja ankaŭ ne devas esti tro alta! Tiel longe, kiel ni ne estas sufiĉe subtenataj per publikaj rimedoj, per kiuj la instruado de Esperanto ricevas garantitan financon bazon, tiel longe la financa demando restas „malmola nukso“ por la kursaranĝantoj. Sed kun nur iometa idealismo kaj kun nur iom da bona volo, multo povas esti farata kaj atingata. Ni esperas ĉiam, ke la unua malfacila tempo de la materialismo ankoraŭ ne povis mortigi ĉiun idealismon kaj ke ankoraŭ trovigos Esperantistoj, kiuj imitos nian karan majstron Zamenhof, kiu malgraŭ ĉiuj mizeroj kaj materialaj zorgoj restis ĉiam unu el la plej grandaj idealistoj de la mondo. Jen la plej bona ekzemplo, kiel oni solvas la financajn demandojn!

Emil Krejbič, del. de UEA,
Kladno, Železářny, Bohemio.

Socia Vivo.

Nokta laboro en bakejoj.

Iuj el la problemoj, pri kiuj la Internacia Labora Konferenco sin okupas, havas karakteron tre ĝeneralan kaj ampleksan, kiel ekzemple la okhora laborago kaj senlaboreco. Aliaj demandoj estas pli limigitaj kaj specialaj. Tia estas la demando pri nokta laboro en bakejoj, kiun diskutados la Konferenco en sia Sesa Kunsido en junio 1924.

La Internacia Labora Oficejo nun estas sendinta demandojn pri tiu problemoj al la Registaroj de la 55 Ŝtatemembroj de la Organizajo. La antaŭparolo al tiu demando enhavas historian rekonton montrantan ĝis kio la malpermeso de nokta laboro en bakejoj estas jam enkondukita en diversaj landoj, kaj diskutata la punktojn, kiuj povas esti konsiderataj de la Konferenco. La respondoj de la Registaroj la tiu demando estos reproduktataj kaj analizataj en raportoj submetota al la konferenco, kiu enhavos provizoran projekton, por servi kiel bazo al la diskutado.

Nokta laboro en bakejoj estis forigata unue de Norvegio en 1906. Aliaj landoj poste sekvis

la ekzemplon, kaj dekses landoj entute leĝdonis pri la afero laŭ unu aŭ alia maniero.

La demando fariĝis frege elstaranta dum la milito, precipe kaŭze de la rimedoj alprenitaj en diversaj landoj, militantaj kaj neŭtralaj, por limigi la konsumadon de grenoj. Por tiu celo, oni pripenis malpermesi la vendon de freŝa pano, kun la praktika rezultato, ke nokta laboro en bakejoj preskaŭ tute ĉesis. En Francujo, ekzemple, sekve de dekreto ordonanta tiaspecan regulon, nokta laboro ĉesis en 75 procentoj el la bakejoj. En Granda Britujo oni malpermesis la vendon de pano farita malpli ol dekdu horoj antaŭe, ordono kiu rezultigis la forigon de multe da nokta laboro en bakejoj.

La leĝoj jam faritaj havas iujn komunajn karakterojn, sed ili diferencas en multaj detaloj. Rilate al la entreprenoj ampleksitaj de la leĝdono, ĝenerale nur la bakejoj kaj kukejoj kondukataj kiel sendependaj establaĵoj estas submetitaj al la malpermeso de nokta laboro.

La daŭro de la nokta ripozo multe diferencas de lando al lando. La plej longa periodo estas de 14 horoj en Svedujo, kaj la plej mallonga de 6 horoj, en Francujo kaj Hispanujo.

La leĝoj ĝenerale permesas esceptojn kaj liberigojn. Iuj ampleksas daŭrain liberigojn por fari preparan kaj aldonan laboron, kiel ekbruligo de fornoj, preparo de panfermentilo, purigo de ejoj. La kelkajemaj esceptoj permesataj en diversaj landoj estas tre malsamaj, sed esceptoj okazas de lokaj festoj kaj foiroj estas tre oftaj en ĉiuj leĝoj.

Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, flidita kaj kompleta informaro, ni bezonas sciigojn (sur poŝtkarto aŭ aparta folio) unuflanke skribita, sed ne inter administrativajn privatajn sciigojn pri ĉiu novaĵo el la Esp. movado. Kondicioj: rapide, koncize, flidite, legibile (precipe nomoj).

Belgujo.

Verviers. 5. Esperanto-tago.

Dimanĉo 30. sept. okazis en „La Mutuelle“, popola universitato, antaŭ tre favora publiko, la disdono de premioj al la laŭteco de la nedeviga kurso de Esp. de la 4. grado de la urbal lernejoj, subvenciata de la ŝtato. Dekunu infanoj estas premiitaj. Ĉestis s-o Hosay, urba konsilanto; s-o F. Grün, provinca konsilanto; s-o H. O. Longtain, direktoro de la urbal lernejoj.

Parolis elokvente kaj konvinkige en franca lingvo s-o Franz Schoofs de Antverpeno, pri la lastaj progresoj de Esp. Fine li adreŝis la parolon al la infanoj en Esp. La publiko estis tre impresita.

S-o direktoro de la lernejoj poste esprimis sian admiron por Esp. kaj admision la urban konsilataron por ke la kurso estigu deviga.

Bulgara samideano, s-o N. Al. Angueloff legis kelkajn vortojn en Esp. de la katedro.

Post la ceremonio okazis la vizito de la ekspozicio de korespondantoj de la lernantoj.

Posttagmeze okazis kun grupoj de Liège kaj Sclessin intima promenado al la ĉirkaŭaĵo. I. D.

Ĉeĥoslovakio.

Praha. Ĉeĥosl. Esp. Instituto malfermis la 1.10. por la ĉeestantoj fakajn kursojn Esp., en kiuj instruas s-oj Elšelt kaj Pilik. Ĉeĥosl. Esp. Instituto aranĝos dum vintro sezono prelegaron pri Esperanto en Praha kaj pretigos propagandan lumbildan paroladon, pruntedonojn al ĉeĥaj Esp. grupoj.

La fondiĝo de Ĉeĥosl. Esp. Instituto vekis en Ĉeĥoslovakujo vivan intereson kaj fariĝis tuj grava faktoro.

La okazinta en Po di brad an. Praha kongreso de la „Virina Ligo por Paco kaj Libereco“ laŭ informo de la bulgaria delegitino, akceptis Esperanton kiel deballingvon.

Nia movado en suda Slovakio.

En Ĉeĥoslovakio, kiel iam la Esperantistaro scias, nia movado post Germanio estas la plej viviga. Tamen mi ne volas mem memorigi pri la tuta respubliko, sed nur pri suda parto de Slovakio (antaŭe norda Hungario).

En Nové-Zámky (Ĝerškujvár) antaŭ 5 jaroj oni ne konis la Esperanton — sed dankon al tiuj, kiuj senlace laboradis — hodiaŭ ni havas jam vigan grupon kun seriozaj kaj eminentaj samideanoj. — En Nové-Zámky troviĝas samideanoj Badin Viktoro, Schmidt Julio, del. de U. E. A., kaj Rémes Josef, al kiuj povas danki la ĉiutaga movado sian naskiĝon.

Tamen plej vigla estas la movado en nia ĉefurbo Bratislava (Pozsony), kie nial granduloj samideanoj D-ro Kamaryt kaj Vanisek laboras. Ĉi tie jam oni povas tre facile trovi Esperantistojn promenanten en la stratoj, ankaŭ gazetbudojn kun Esp. gazetoj. — En Sereď, Levice, Púch, Lučany, Komarno ktp. ankaŭ jam reviviĝis la movado. Preskaŭ ĉiutage okupas sin la gazetoj pri Esperanto.

Sed ni returniĝu Nové-Zámky-on. Post trijara peŝa laboro fine fondiĝis grupo, kiu estis baptita: „Esperanta Rondo Amika“, kies solena fonda kunsido okazis en la gimnazio je la 17. 9. Ĉestis multaj ĝeesperantistoj kaj Esperantemuloj el la urbo kaj apudaj vilaĝoj, el Komarno samideano Sprušanský policoŝtisto. Je la 8 a. horo, salutante la ĉeestantojn, del. Schmidt malfermas la kunsidon parolante pri Esperantismo. Lian paroladon sekvis la brila oratora parolado de samideano pastro D-ro Körper pri la neceso de la internacia helplingvo por paco de homero. Li parolis Esperante, slovake kaj hungare. Poste samideano Badin parolis pri la evolucio de Esperanto en la urbo, kiu estas la propaganda laboro. Laŭdante li rememoras la samideanojn, kiuj ebligis, ke la grupo jam antaŭ la fondo estis havanta kelkcentojn da libroj kaj ankaŭ kelkcentojn da kronoj. Poste li tralegis la alvenintajn lertelsutojn. Granda aplaŭdo sekvis lian raporton, kaj oni nomigis lin „Esperanto-kolono“ de urbo. — Poste raportis samideano Rémes pri la stato de biblioteko.

Tion sekvis la balotado, kaj elektita estraro estis la sekvanta: prezidanto D-ro Körper Karlo, teologia profesoro, viceprezidanto: Geider Geza, urba oficejo; sekretario: Schmidt Julio, elektristo, del. de U. E. A.; vicsekretario: Olvečky Karlo, privata oficejo; kasisto: Badin Viktoro, komercisto; vicekasisto: Bujaček Vilem, poŝtoŝtisto; libristo: Rémes Josef, razisto; insigantoj: Edegen Róth, juristo kaj Badin.

Laŭ decidita akcepto baldaŭ estos malfermitaj 3 kursoj, 1 scienca, 1 burĝa, 1 laborista; gvidantoj D-ro Körper, Geider kaj Schmidt. Vespere je la 10 h. disĝis la kunveno.

Do la movado lasttempe estas sufiĉe vigla en suda Slovakio, kaj mi esperas ke Nové-Zámky la iama malnova foritajlo defendas la fidelulon de Esperanto. Do mi ege rekomendas al miaj samidanoj samideanoj prepari la venontan landan kongreson en Bratislava en la bela, komerca, mezepoka kaj plej granda urbo de Slovakio apud la Danubo.

Komitatano.

Danujo.

Kopenhago. La 10 de oktobro okazis en „Societo de Esp. Interesatoj“ membruokunveno. S-o Krel faris paroladon pri „Esp. kaj komerc“ forte aplaudita. — Poste s-o Okholm prezentis amuzajn filmojn. — F-ino Rybo, la prezidanto de la Societo, uzis la okazon sciigi la membrojn pri la ĵus alvenintaj informoj koncerne la situacion de Esp. en la Ligo de Nacioj.

Germanujo.

Düsseldorf. En la programo de la akademioj kursoj por ĝenerala plibonkigo kaj ekonomiaj sciencoj prelegoj pri Esp. kaj Esp. kursoj dum la vintro. — F-ino Rybo, la prezidanto de la Societo, uzis la okazon sciigi la membrojn pri la ĵus alvenintaj informoj koncerne la situacion de Esp. en la Ligo de Nacioj.

Germanujo.

Mainz. Rh. En la urba komerca lernejo, kurso inter la profesiaj instruistoj komencita kun 9 partoprenantoj. Gvidanto s-ro Flatters. Oni faris priskribon al la popola lernejo akcepti Esperanton, bedaŭrinde sen sukceso, ĉar iu sinjoro asertis ke Esperanto ne estas scienca afero, sekve de tio ne objekto por popola lernejo. La klopodoj estas daŭrigataj. Per la urba lernejoŝefo oni disdonis leterojn al la instruistaro de Mainz por interesi ilin al Esp. Ekspozicio en vidfenestroj de publ. magazenoj.

Hungarujo.

Paroloj pri interna ideo en Budapeŝt.

Neatendite interesa diskuto kunveno okazis ĉe la budapeŝta unua Esp. grupo en la Socia Muzeo. La temo estis la interna ideo de Esp. La unua parolinto P. Balkányi, konkludis post preparado de diversaj paroladoj de D-ro Privat, ke la interna ideo estas tiu vigla fonto por Esperanto, kiu estas ĉe la naciaj lingvoj la nura bona kaj sana nacia sento. La konscio pri komprenigo kun diversaj homoj, la volo progresigi la komprenadon, la ĝojo pri novaj amikecoj eksterlandaj, la disvastigo de propranacia kulturo estas eroj pli gravaj de interna ideo, kiun vole-nevole sentas kaj transprenas ĉiu vera Esperantisto. Oni do ne devas flankenlasi ĝin kaj ĝian protektadon. La homaro sopiras pri idealismo kaj en tio Esperanto ludos grandan rolon pere de interna ideo, kiu malkas eĉ aliaj lingvoprojektoj nesukcesaj. D-ro L. Lóránd konigis la parolojn de D-ro Zamenhof pri tiu temo kaj lian — kun la interna ideo ne intermiksolan — projekton pri homarantismo. S-ro Major opinis, ke lingvo kaj ideo estas apartigeblaj kaj oni devas pli multe praktike uzi la lingvon en la societo. Kelkaj diskutis pri tio, ĉu estas bone klarigi al novaj lernantoj la internan ideon. Fine Julio Baghy komparis nian movadon per arbo, sur kiu la fruktoj portantaj branĉoj estas la Esperantistoj kun interna ideo — ili zorgas pri evoluo, disvastigo, propagando — la foliojn kaj florajn portantaj branĉoj estas la realistoj sen interna ideo, diversaj fakoj, kiuj estas necesaj por ŝirmi la fruktojn kontraŭ suno aŭ pluvo kaj ankaŭ por ŝirmi la arbon. Do ambaŭ laboru konkorde. — Hung. Esp. Servo.

Luksemburgo.

En tiu malgranda lando troviĝas nur kelkaj Esperantistoj. La nombro de idioj estas proporcie pli granda. Kiel oni skribas al ni el la urbo Luxembourg, kunigo de la izolaj samideanoj estas projektata.

Nederlando.

Festvespero de la Haga Esperanto Asocio

„Fine ĝi venkos“.

Belan feston aranĝis la Haga Esp. Asocio „Fine ĝi venkos“. La salono estis bone plenigata de 500 personoj, inter kiuj virina deputito, kaj aliaj aŭtoritatoj.

Lertaj artistoj ludis la spritan propagandan teatraĵon „De Blijmoedijes“ verkita de f-ino Boon. S-o Koens rebe kantis holandajn kaj Esperantistajn kantojn, dum s-o Rijnens deklamis kun granda talento. Entute bona sukceso por nia movado en Hagao. J. S.

Utrecht. La Utreĉtiĉa Esperantista Klubo rememoras la 18. de novembro la daton de sia fondiĝo antaŭ dudek jaroj. Ĝi estas la plej malnova Esp. klubo en Nederlando kaj por deĉe rememori la tagon, kiam komenciĝis la organizado de la nederlanda Esperantistaro, ĝi preparas feston, al kiu ĝi kore invitas alirubajn samideanojn. Vizitintoj scigu sian alvenon al la adreso: Esperanto-Vereeniging, Damplein 25, Utrecht.

La klubo vivo pli kaj pli vigligas; ĝis komenciĝis nova kurso, dum krome okazas ankoraŭ du pliferdektaj kursoj, kiujn gvidas s-oj Droste Baaten kaj Degenkamp. Ĉiusamaĵe okazas kunvenoj. G. F. D.

Polujo.

Borislav. Esp. kurso kun 15 personoj inter petrol-laboristoj en laborista popoldomo.

Rumanio.

Arad. Kurson por laboristoj gvidas s-anino Margareto Roth.

Caransebeș. Nova kurso kun 20 partoprenantoj, gvidata de s-o Edmundo Vincze, del. de UEA.

Cernăuți (Czeronowitz, ĉefurbo de Bukovino). En tiu grava universitata urbo bele ekfloris nia movado dank' al la fervora kaj modela agado de s-o majoro Arnold Hasenöhrl, del. de UEA. La 3-an de sept. li malfermis 2 kursojn, kiujn grandnombro partoprenas ĝesinoroj el la plej inteligenta societo, inter ili multaj kuracistoj, profesoroj, oficejoj, artistoj k. a. De la 15 a. de sept. li instruas Esp. ankaŭ en la Berlitz-lernejo.

Barbănteni-de-Jos (Transilvanio). S-ano Alberto Oliver malfermis kurson por 10 personoj.

Deva (Transilvanio). S-ino Serafino Fodor, tre agema videlo de UEA, malfermis kurson por 12 reallernejoj.

Lugoj (Banato). Pluraj personoj fervore ekternis Esperanton. La redakcio de la ĵurnalo „Resuna“ kaj „Krasso-Szörényi Lapok“ proponis al nia movado plenan subtenon.

Svedujo.

Esperanto en Malmö.

La 2. okt. la klubo Esperantista en Malmö aranĝis publikan propagandan kunvenon en la popoldoma fest-salono. Devis paroli germana samideano, del. de U. E. A. en Dresden-Dobritz, Emil Friebe, pri „Esperanto kiel mond-lingvo“. Kaŭze de la lasttempaj okazintaĵoj en Germanujo li bedaŭrinde estis malhelpita alveni.

Anstataŭ li paroladis tre detale Ernst Andersson. Por konatigi la lingvon la parolado estis farita Esperante. Tradukis ĝin s-o L. Jönsson. Ankaŭ muziko kaj kantoj Esperantaj estis prezentitaj de s-o Erik Andersson. La aranĝo sukcesis bonege. Kursoj komencos.

Al hodiaŭa numero estas aldonita la oktobra „Revuo“.

Uzebla.
27. 9. 23. Z.

Malica volo.

Kara s-o redaktoro!

„La mondo estas perfekta!“. Komprenu, ne mi diris tion, — min vi certe ne kredus — sed tion diras via ŝatata flugfolietisto, do — estas vera tio. Nu, el la flugfolieto mi ekscias, ke ĉia malbono, ĉia malfeliĉo, ĉiuj malagrablaĵoj, ĉiuj impertinentaĵoj devenas ekskluzive el la malica volo de niaj kunhomoj. Sed antaŭ ol prediki kontraŭ ĉi tiu demono, la flugfolietisto prefere forigu de si mem ĉi tiun pekon. Jen! Mi amas kore mian Esperanton, mi oferas tempon kaj monon, mi riskas eĉ mian familian pacon verŝante plej aktualajn kaj interesajn artikolojn, plej entuziasmajn poemojn, plej korusajn rakontojn, plej frapanajn novelojn kaj plej belajn kantojn, por perfektigi, kontentigi, entuziasmigi, distri kaj eduki la legantojn. Sed li, la despota cenzuristo, repagas per nekompreno, maldanko, blindeco kaj impertinenta refuzo. Li prenas sian dikan, ruĝan kralonon, trastrekas malkompate la liniojn skribitajn kun tiom da amo, diligentece kaj delikateco kaj skribaĵas kun diabla rikano, plumknare, (per kraĵono? Red.) per angula, maldelikataj literoj sian arrogantan „Ne uzebla“ sur la margenon. Malica volo! Kaj tamen li kuraĝas fanfaronkrii en la mondon, ke „la mondo estas perfekta, ĉio necesa, nenio aldonebla, nenio deprennebla, ke nur blindaj revemuloj povas postuli lumon sen ombro“. Nu bone, mi ja volonte konsentas esti la ombro kaj lasas al li esti la lumo, sed ankaŭ mi estas necesa, li havas nenian rajton tiel despoite forstrekii min. Li ĉesu fari nin bedaŭrindajn „verkistojn“, „pesmistojn pro malespero“, por ke ni „ne retiru nin kaj pereigu por la nobla movado“. Ne, kara s-o redaktoro, unue li mem „videble diferencu de aliaj homoj“, unue li mem donu bonan ekzemplon, — ni volonte sekvos lin.

Entute mi ne tute komprenis. Mi estas ĉiam preta sekvi bonajn konsilojn. Do mi tuj klopodis forigi la malagrablajn fuŝkomprenajojn inter mi kaj mia edzino. Sed ĵu pli multe mi pripensis la aferon, des pli konfuziĝis mia kapo. Jen — ĉu la despotato de mia edzino estas la sekvo de mia diŭbo aŭ ĉu miaj diŭboj kaj diŭbiĝis per la despoteco de mia edzino? Do ĉe kiu el ni estas la malica volo?

Eble vi scias tion. Se jes, skribu baldaŭ al via amiko

Kristiano Mallerta.

Scienco.

Disvastiĝo de la metrosistemo en Azio.

Estas dezirinde, ke la simpla decimala sistemo internacie estu uzata. Ĉie oni jam faris kaj faras paŝojn por enkonduki ĝin en la ĝeneralan uzadon. En Japanujo oni permesis ĝian uzadon en 1893, antaŭ nelonge oni enkondukis leĝon, kiu faras ĝian uzadon deviga. En Ĥinujo, kie ekzistas tiom variaj mezursistemoj, en 1908 oni fiksis la rilaton de tiuj mezuroj al la metro, en 1913 oni decidis post 10 jaroj definitive enkonduki ĝin. La 10 jaroj ĵus pasis, kaj la scienca mondo turnas siajn okulojn kun scivolemo al tiu granda orienta imperio: ĉu la tieaj kondiĉantoj de la spirita vivo havas la kuraĝon kontraŭbatali la tradicion kaj realigi tiun leĝon. En Siamo oni ankaŭ jam en 1912 enkondukis la metrosistemon. Se ni ankoraŭ aidonas, ke komence de 1930 ankaŭ Nordameriko uzos la decimalan sistemon, kun ĝojo ni povos konstati ke la mondo ŝajnas kompreni la gravecon de la unueca metrosistemo.

Josefo Major, Budapeŝto.

Efiko de kanon-pafo.

Antaŭ nelonge aperis en angla ĵurnalo du demandoj, el kiuj unu estas jena: —

„Se kanono estus metita sur dezertan insulon kaj aŭtomate pafita, tute ekster la aŭdo de ĉiu vivanta estaĵo, ĉu rezultus bruo?“

Al tiu demando la „ordinarulo“ respondus jese; tamen se ni esploras ĉi tiun demandon fundamente ni trovos necesa nean respondon.

La kanono estas pafita tute ekster la aŭdo de ĉiu vivanta estaĵo. Jen la respondo-ŝlosilo.

Ĉiuj interesataj pri la „Radiotelefono“ scias, ke post kiam la son-ondoj aŭ muzikaj aŭ voĉaj eniras la mikrofonon, bruo ne estas. Nur elektra moviĝo okazas tra dratoj, kiuj ĵetiĝas al la etero kaj estas ricevita per la antenoj. Nenia bruo ekzistas ĝis la diafragma de la aŭskultilo vibras kaj tiel kaŭzas son-ondojn inter la dirita diafragma kaj nia timpano, kiun niaj sentadoj transformas al sono aŭ voĉo aŭ muzika laŭ la ondoj, ricevataj de la mikrofono.

Science okazas samo en pli simpla formo, kiam la kanono estas pafita sur dezerta insulo. La aero anstataŭas la „radio-aparaton“ menciitan. La kanono, kiam ĝi pafas, forte agigas la aeron, kaj kaŭzas son-ondojn.

Do, se ne estas timpanoj por interpreti tiujn sonojn en bruon, ili simple restas son-ondoj ĝis senfortiĝo pro distanco.

La duan demandon mi pritraktos alian fojon.

E. R. Read, London N. 14.

Geografio.

Teritorio de R.S.F.S.R.

Antaŭrevolucia Rusujo okupis spacon de 19155000 kvad. km., prezentis seponon de l' tuta tersurfaco, kaj havis 1915 ĉirkaŭ 182000000 loĝantojn.

Teritorio kaj loĝantaro rimarkinde plimalgrandiĝis dum revolucio kaj interna milito. Someron 1922 R.S.F.S.R. okupis spacon de 16915900 kv. km. kaj estis loĝata de 132000000 homoj.

Grandaj urboj (pli ol 100000 loĝ.)

en Rusujo

laŭ loĝantara registro 1920.

	1920	1911
1. Moskvo	1028218	1505500
2. Petrograd	705908	1911400
3. Odesa	454857	498100
4. Kjev	365737	446800
5. Harkov	270924	225500
6. Tiflis	246910	191800
7. Taŝkent	245091	195500
8. Baku	206500	222100
9. Saratov	190195	202300
10. Rostov (Don)	176770	124500
11. Samara	170497	124900
12. Ekaterinoslav	164288	151200
13. Kazanĵ	146495	182500
14. Omsk	144525	91200
15. Krasnodar	143157	?
16. Tula	129147	155100
17. Astrahan	122648	149800
18. Kokand	120984	115000
19. Nikolaev	108777	97500
20. Orenburg	108768	93600
21. Irkutsk	103920	88700

Tekniko.

Tre longaj telefon-komunikaĵoj.

En Eŭropo, tiuj telefon-komunikaĵoj ne atingas, nek alproksimigas al tiuj de Ameriko, kie funkcias telefon-komunikaĵoj ĉ. 9000 kilometrojn longaj. Per lampaj sonfortigiloj oni atingas, ke aŭdantoro povas aŭskulti la alvenantan sonaron.

Ni citas, ke oni nun projektas telefon-komunikaĵon inter Paris—Strasbourg kaj Paris—Le Havre.

Josefo Major.

Parolejo.

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas lojale enpresataj ĉiuj scigoj, informoj, kritikoj, liberaĵoj vortoj ktp. La redakcio tamen ne prenas sur sin ĉiun respondecon pri la enhavo, sed ĝi rezervas al si la rajton eventuale rifuzi netaŭgajn artikolojn.

221. Rilatas al 215.

1. S-o Vimson malprave kondamnas iu-ajn, ĉiu-ajn ktp.; sole „kiu-ajn“ kiel demanda pronomo estas, laŭ lia opinio, ĝusta. „Same kiel ni ne povas diri: nenkui, nenkial ktp.“, ĝuste same ni ne povas diri: iu-ajn, ĉiu-ajn, ĉiam-ajn ktp., ĉar nur la demandaj formoj de ...ia, ial ktp. estas kunuzataj kun la vorto „ajn“.

La opinio de s-o Vimson bazas sur bedaŭrinda eraro de Zamenhof mem, parolanta en § 50 de la Ekzerco (ne la Fundamento! La Fundamento konsistas nur el la reguloj, en kiuj ĉia ŝanĝo estas malpermesita) pri „demandaj vortoj“ kunmetitaj kun ajn. La eraro konsistas en tio, ke ne demandaj sed rilataj estas tiuj pronomoj kiu-ajn, kie-ajn ktp. Kiel ni povas kaj ĉiujfoje uzas: Diu, kion-ajn vi vidas. Sed se eĉ Zamenhof efektive intencis uzi ajn sole kun kiu, kio ktp. — ne kun iu, ĉiu ktp., la fakto, ke temas pri pronomoj rilataj, ne demandaj, igras nin pli-vastigi la kunmeteblecon de „ajn“ se ne koncerne ĉiujn pronomoj, do almenaŭ koncerne (ĉiuj, ĉiuj) ktp., ĉar la lastaj estas jam entenataj en la pronomoj rilataj: diru, kion-ajn vi vidas = diru (ĉiuj)an kion vi vidas.

Mi rimarkigu, ke la rakitero de ajn tute ne estas sama kiel tiu de menciita en la sama § 50 vortparto „nen“. La lasia, memkompreneble, estante nek afkso, nek memstara vorteto, povas enesi ekskluzive en difinitaj de Zamenhof mem vortoj kiel neniu, neniam ktp.

„Ajna“, „ajnujo“ k. s. ne estas „tute regule formitaj, same kiel eta, ero, aĉa, nea ktp.“, same kiel ne estas regule formitaj ĉiuj, ĉiloko, kvankam oni tre regule uzo ĉi-loko, ĉi-supre ktp. konservante la karakterizan strekton (-). Tio kion mi ĵus konstatis evigilas al ni ĉian timon pri intermiksleco de la pronom-adverba vortparto ĉi en ĉiuj, ĉiel ktp. kun la proksimiga vorteto ĉi- en ĉi-tu, ĉi-tio ktp.

2. „Ĉe niajn amikojn“ ne estas samsignifa kiel „al niaj amikoj“. Ĝia signifo estas en la kutiman ejon kie niaj amikoj estas, verŝajne: hejme. La neŭro de ĉe estas ne nur tempo, sed ankaŭ, eble eĉ pli eminente, loko: sekvu ĝi povas poshavi akuzativon, nome tiun de direkto. Solaj la prepozicioj „al“ kaj „gis“ per si mem esprimantaj la direkton, ne povas poshavi akuzativon de direkto. En la praktiko multaj, inter kiuj ankaŭ ni rimarkas s-on Vimson, rifuzas la tro pedantan „ĉe-n“, ĉar el certaj cirkonstancoj komprenigas, ke „al niaj amikoj irante“ ni iras al ilia hejmo, kvankam ja ne en ĉiu kazo tio ĉi okazas.

Leo Dreher, Kraków.

222. Rilatas al 212.

Al samideano Ĵuryŝia mi respondas, ke nia majstro ĉerpis la sufikson -aĉ verŝajne ne el la al nejuĉoj mal-multe konata jida idiomo, sed el la intern-cie multe pli grava hispana lingvo. Ekz. hombre (homo), hombracho, parolu: ombracho (homaĉo).

M. Butin, L. K.

223. Rilatas al 211.

Samideano Teterin estas tute prava, same D-ro Fiŝer. Sed ambaŭ eble ne scias, ke unu vorto en Esperanto efektive estas prenita nur el la pola lingvo; estas ŝelko (pole szelky).

M. Butin, L. K.

224. Pri Zamenhofa Monumento.

„Esperanto“ de septembro 1923 sciigas, ke la Internacia Komitato por la Zamenhofa Monumento decidis akcepti definitive la unuan projekton.

Mi ne volas pridiskuti la decidon, kvankam mi ne povas laŭdi la strangan aranĝon de la konsilio al la

Esperantistaro, ĉar oni ne montris la nepran kondiĉon por la monumento, nome ke ĝi ne devas reprezenti homajn figurojn.

Sed jen ĉefa afero pri kiu ankoraŭ oni rajtas diskuti. Ĉu vere oni estas preta akcepti subskribojn de nomoj de naciaj societoj sur la flankoj de la monumento — por nomo kaj reklama celo? Tio ja estas monstra erarego! kaj difektus materiale kaj ideale la monumenton.

Ekzistas eĉ ne unu nacia societo, eĉ ne unu Esperantisto, kiu ne deziregas memorstilon por nia majstro. Kiel do oni volas diferencigi inter ĉiuj, kaj akcepti ĉiun nur de kelkaj, kiuj volis aŭ povis p a ĝi por memvanto? Ĉu la mankontaj nomoj ne malpligrigas, se ne la gloron de Zamenhof, tamen la ĉikon de la monumento? Ĝi devas esti monumento de ĉiuj Esperantistoj.

Kaj jen sole ebla surskribo: Al la Majstro, la Esperantistoj en la tute mondo.

Esselin, del. UEA, Nancy.

225. Pri gvidlibroj.

Se oni rigardas E-ajn gvidlibrojn tra arboj aŭ regionoj, oni ofte renkontas proprajn nomojn el nacia lingvo, kiuj estas neparoleblaj aŭ minimume ne ĝuste paroleblaj por Esperantisto, ne scianta ion pri la koncerna lingvo. Bedaŭrinde nur malofte oni trovas aldonitan klarigon pri la elparolo. Ĉu iu kredas, ke ĉiuj Esperantistoj povas imete ĝuste legi: Dachstein, Ischl, Lechtal, Lüsschberg, Montreuse, Podwoloczyska k. s.?

Oni konsciu, ke granda parto de la Esperantistaro estas nemulte instruita rilate aliajn lingvojn kaj agi konsekvence!

Leono Funken, Koblenz, Germ.

Petskribo al la Internacia Poŝta Unio.

La gravan petskribon al la Internacia Poŝta Unuiĝo la Haganoj bonvolu subskribi kiel eble plej baldaŭ ĉe unu el la ĉi-subaj kolektantoj: H. B. Alkemade, Fr. Hendriklaan 164; Centra Esperanto Librejo, Bankastr. 2; H. J. de Geest, Trompstr. 278 1; G. W. Kist, Zusterstraat 70 1; C. de Klerk, Mackaystraat 52; Lunĉejo „Carrels“, Weimarstr. 65 aŭ ĉe J. Ravestein jr., del. UEA, v. Aerssenstr. 200.

Al niaj legantoj!

Funkcio de nia oficejo.

Ni ĵus efektivas kompletan reorganizon de nia oficejo. Personoj, kiuj havas ankoraŭ iujn ne plenumitajn pretendojn, bonvolu tuj skribi al ni por bona ordigo.

Por la estonteco ni nepre garantias bonan funkcion de nia oficejo.

Kongres-numeroj Nürnberg.

Al pluraj denovaj plendoj kaj sendopetoj ni devas respondi, ke pro la specialaj cirkonstancoj en la teritorio de nia sidejo nia kongres-kesto ne iam alvenis.

Ni certigas ĉiujn mendintojn, ke ili post alveno de la provizo ricevos ĉiujn ekzemplerojn al ili mankantajn.

Pago per banknotoj.

Oni kelkfoje sendas al ni malfpuregajn kaj tute difektitajn monbiletojn, kiujn la bankoj rifuzas.

Ni sciigas, ke ni estas same devigataj rifuzi tiajn monbiletojn.

Pseŭdonimaj sendaĵoj.

En lasta tempo oni sendis al ni diversajn anonimajn sendaĵojn. Ni atentigas, ke ni ne povos publikigi pseŭdonime subskribitajn artikolojn, se la sendantoj ne almenaŭ sciigas al nia administracio sian plenan adreson. Konsiderante ankaŭ la absolute neŭtralan karakteron de nia entrepreno, ni bedaŭras ne povi akcepti artikolojn kun partia politika tendenco.

„Internacia Scienca Revuo“.

La kajero 7—9 de tiu ĉi gazeto estas ekspedita dum tiuj ĉi tagoj. La sekvanta kajero ne jam estas presita.

Redakcio kaj administracio de ET.

Abon-Tarifo,

Ni petas noti, ke la abonprezo por Polujo estas 4000 pmk.

Sekve de pres-eraro la prezo indikita en ET 159 estas malkorekta.

Komercestoj!

Mankas

ankoraŭ viaj

raportoj kaj informoj

por la venonta

numero de

IK.

Sendu ilin tuj

al Redakcio de

„Internacia Komerc“

HORREM bei Köln,

Germanujo.

Alvoko al Balkanaj Samideanoj.

Ĉiu samideano, observinta en aŭgusto 1923 helan falstelon (meteoro) de helverda koloro, estas petata respondi laŭ suba adreso jenajn demandojn:

1. Kiam estas observita la meteoro (tago, horo, minuto)?
2. Kiu estis ĝia pozicio inter la steloj (aŭ almenaŭ la direkto)?
3. Kia estis la koloro (eble, ŝanĝanta?) de la meteoro?
4. Loko de l' observo — se eble, ĝia geografia pozicio.
5. Ĉu estas ie observita falo de la meteoro sur la teron? Se jes, kie? Detalojn!!
6. Ĉu la respondoj estas donitaj kun certeco, aŭ nur proksimume?

Se vi mem nenion observis, demandu konatojn! UEA-del. estas petataj enki en sialanda gazeto. UEA-del. en urboj, kie estas astronomia observatorio, estas petataj tie sciiĝi pri eventualaj observoj.

Respondoj estas laŭ deziro rekompencotaj per il. pk.

B. Lebidinski, vicdel. de UEA,
Cernaŭti, Rumanio, str. Română 45-bis.

JAM

aperis la bonega originala
Esperanto-opere
en unu akto

Ho, tiuj fremduloj!

Teksto kaj muziko de Feliks Hiller.

Mendu ĝin en via librejo aŭ ĉe la
**Eldonejo J. ŜAPIRO, Białystok,
Lipowa 33.**

ĈU VI DEZIRAS LEGI ?

la en ET jam aperintajn literaturajojn

★
Mendu tuj „Bukedo“

1-a volumo. Prezo po 1.— sv. fk.

Por abonantoj 3 ET-numeroj.

Eldonejo Esperanto Triumfonta, Horrem b. Köln.

Grava!

Oni vendas germanajn patentitajn elpensojn (D. U. G. M. & Co. R. P.)
Bonaj artikoloj, malmultekoste fabrikataj.
Por la elpensiĝo aldonu la valoron de du resp.
kup. en nacia mono (ne en kuponoj!).

P. Becker, Del. U. E. A. Augustiner-
strasse 58, Mainz a. Rh. Germanujo.

Jus aperis

„La Reĝo Judea“

Dromo en 4 aktoj kaj 5 bildoj. El rusa lingvo tradukvis V. Devyatkin. Esperantan tekston irarigardis magistro de teologio kaj akademiano prof. A. Dombrovski. — Rekomendita de Esp. Lit. Asocio. Dua eldono. 182 paĝ. 15x18 cm. Prezo broŝ. 2,25 sv. fk. bind. 2,75 sv. fk. plus 0,50 sv. fk. sendokoj. Por revendiĝoj rabato.

„La Reĝo Judea“ estas verkita de anonima, tamen tre konata, eminenta rusa poeto, sin kaŝanta sub literoj „K. R.“ La verko estis ludita en Rusujo, en la imperiestra teatroj antaŭmultaj. — Ĝi estas tradukita en sep lingvoj. — La eldono, presita en Dresden (Wilt. Lippert) havas elegantan eksteron kaj estas sen preseraroj.

Mendu ĉe la eldoninto

P. Medem, Kaunas

Smeliu g. 12 (Litov.)

Kontraŭ denredo de respektiva nombro de ET-numeroj el la abonanto

ni liveras al abonantoj

la libron

„Litova Almanako“.

285 paĝoj, modelo, instrua, interesa. Prezo 3,50 sv. irk.

Mendu tuj! ĉe la Administracio de ET.

La nova eldono de BES-a Adresaro jus aperis.

Prezo: 1 sv. franko. Duona prezo por malbonvalutuloj.

Mendu ĝin senpere ĉe

Butin & Jung, G.m.b.H.,

Esperanto-Eldonejo

Godesberg (Germanlando)

Bahnhofstrasse 30.

Postĉeka konto Köln 920 36.

Anoncetoj.

FIANCIGO. F-ino Hedda Tyroler en Timișoara (Rum.) kun Jozefo Pilizer en Budapeŝto (Hung.).

EDZIĜO. S-o Joachim Campepadros, helprezidanto de la Esperantista grupo en Perpignan, edziĝis kun f-ino Godoberte Palacios, Esperantistino, la 6. oktobro 1923.

EDZIĜO. S-o Otavio La Mura, sekretario kaj kasisto de „Rivarola Esperanto Unuiĝo“ kaj f-ino Antonietta Martinotti, samideanino en Rivarolo Ligure, edziĝis la 8. oktobro 1923.

EDZIĜI deziras inteligenta fraŭlino (hebreno) el plej bona familio, oficefino, havante aranĝitan loĝejon, kun intelig. simpatia hebrea, Esperantisto, komercisto, oficejo ktp. inter 30—40 jaroj. Leterojn kun portretoj sendu al: Anna Förster, Kraków (Polujo), Poste restante. Korespondas Esperante, pole kaj germane.

LA GORNA-GUMAJA LERNANTA GRUPO intencas aranĝi ekspozicion de Esperantistoj je la 2. decembro k. l., ĉi tie ni petegas ĉiujn gesperantistojn sendi al ni ekspoziciajn. Adreso: Stefan N. Vardev, IV uĉ, Nr. 551, Gorna Gumaja (Bulg.).

GRAVA POR SPORTISTOJ! Aranĝante informservon ĉe polaj sportaj ĵurnaloj, mi deziras ricevi sciigojn de ĉiujlandaj Esperantistoj pri sialanda sporto. Bonvolu tuj fari proponojn kaj skribi al J. Kveitman, Łódź (Polujo), Przejard 14. Interŝanĝas ankaŭ sportajn revuojn.

INTERŜANĜANTOJ ATENTU! Laŭ ĉiu foto mi fabrikas belegajn koloritajn Esperanto-gumarkojn, montrantaj vian portreton, nomon kaj adreson. Uzeblaj por fermi leterojn, beligi leterpaperojn aŭ por interŝanĝo. La foto estos nedifektite resendata. Prezo: por 12 ekz. 1,20 sv. fk., 56 ekz. 2,50 sv. fk. aŭ egalvaloro. Franz Christoph, Wien V, Getreidemarkt 15.

BONVALUTAJ SAMIDEANOJ! Oficejo, malriĉulo malsana, en tre malfacila situacio, petas donaci aŭ prunti 50 liron. aŭ 20 sv. fk., aŭ 5 dolarojn por vivrimedo. Helpu gesamideanojn. Adreso: Jakulin Mario, Ljubljana (Jugoslavio), Bar. pri Koliu. 50. 15.

JE MALALTA RENTUMO serĉas pruntepreni 1000 dolarojn aŭ 200 sterlingajn pundojn, juna arĥitekturo por pligrandigi la negockapitalon. Laŭ deziro estos tuj ĉi pruntepreno garantiata je unua hipoteko. Bonvolu skribi al J. Florian, Velké Nemčice u. Hustopeče (Ĉeĥoslovakio).

ATENTU FILATELISTOJ! Vera maloftaĵo estas kaj certe estas la nova unufoja eldono (kupro-preso) de germana poŝtmarko po dekml markoj kun bildo de Kolonia Katedralo. Kontraŭ 2/3 guldonoj aŭ egalvaloro nacia mono mi sendas 2 pecojn. Mi ankaŭ dissendas ĉiujn aliajn pm. kontraŭ garantismeto. Oni pagu nur per monbiletoj. Adreso: Joseph Pfaffenholz, Düsseldorf 106 (Germanio).

NIA SAMIDEANO WLADISL. MICSEČ en Budapeŝto estas trege malfacila (blindigita kaj paralizita ĉe ambaŭ kruroj) kaj nuntempe li estas state devigita dividi sian enspezojn inter kvar (altaj ekzististoj), pro kio neniu el ili povas vivi. Mi petegas vin, samideanoj precipe bonvalutuloj, helpu kiel kaj kiom eble plej povos. Jen okazo vera montri Zamenhofan spiriton. Donacojn perados Georg Menzel, Apotekestro, Breslau, Hohenzollernstr. 20. (Rekomendita de la redakcio).

ANGLA MONO PAGOTA (GRANDA SUMO) por ekzemplero de OSTRONIERAJ TESTAMANTOJ EN RUSA LINGVO. La Vostokov aŭ faksimilo. Skribu al HIRST, 19 Lion Chambers, Huddersfield, Anglujo.

Korespondo kaj Interŝanĝo.

S-o B. Czechowski, Malgrand-Polujo, Borislav, domaro de „Nafsa“ XVI, modelisto, deziras korespondi metie kun sammetlistoj, metalistoj, teknikistoj. Ŝanĝas profesiajn lernolibrojn il., ankaŭ leterojn.

Fraŭlo Koršai Ferenc, Budapeŝto V, Széchenyi-utca 1 (Hung.). prokuristo, 31-jara, deziras korespondi per 1. kaj pk. il. kun kleraj ĉiujlandaj samideanoj. Korespondas ankaŭ france, germane kaj itale.

S-o J. T. Jokinen, Bulevardiuk 2, d. 17, Helsinki (Finlando), deziras korespondi kun ĉiujlandaj Esperantistoj (precipe kun fraŭlinoj) per l. kaj pk.

S-o Alfons Kitzschke, ferkomercisto, Trautenau, preĝejaŭba 21 (Ĉeĥosl.), deziras korespondi per il. pk. kaj l. kun Japanujo, Ĥinujo, Persujo, Aŭstralio, Javo, Ruslando, Turkujo, Afriko. Ŝanĝas ankaŭ pm. kaj moneretojn.

S-o Rudolf Müller, Georgsplatz 44, Brand-Erbisdorf i. Sa. (Germ.), deziras korespondi kun gesamideanoj ĉiujlandaj pri ĉiuj temoj. Li kolektas Esperantajn kaj ĵun.

S-o Reinh. Larsson, Kyrkogatan 113, Amål (Sved.), deziras interŝanĝi il. pk., l. kaj gazetojn kun samideanoj el la tuta mondo.

Interŝanĝo de poŝtmarkoj pogrando (5—20 pecoj de unu speco) ankaŭ sur folioj kun ĉiuj landoj. Fuŝsendaĵoj malakceptataj. Respondas ĉiam. Bazo Yvert, Senf ktp. S-o Jan Basil, Sl. Ostrava 955 (Ĉeĥosl.).

F-ino Manjo Bastová, Sl. Ostrava 955 (Ĉeĥosl.), deziras interŝanĝi pk. bildlibranke aranĝitaĵoj kun ĉiuj landoj.

Mi deziras korespondi ĉeĥe aŭ Esperante kun pentristo (dom., ligno- aŭ litempristo) en Ĉeĥoslovakio pri la meĥo kaj lebonkondiĉoj, situacio de la laboristaro en Ĉeĥoslovakio ktp. C. J. Degenkamp, Rietstraat 40, Utrecht (Nederlando).

26-jara detektivo (tutmonda pollicigano) korespondas kun tutmondaj inteligentaj gesamideanoj pri diversaj temoj, precipe kun fraŭlinoj kaj samikuloj. Josef Sprušanský, Nádor strato 54 Komarno, (Ĉeĥosl.).

Aĉenton! Isaj Dratwer, Warszawa (Polujo), Muranowska 26/32 elsendas por 1 sv. fk. aŭ egalvaloro, 15 sovversajn plus 10 polaj pm. Ĉiuj bonvalutuloj, diversaj, nedifektitaj. Ankaŭ deziras interŝanĝi pm. pk. il. kun Turkujo, Grekujo, Ekstereŝtaroj.

S-o Moses Jelin, str. Gieldona 8, Białystok (Polujo), deziras korespondi per il. pk. kaj l. kun la tuta mondo. Interŝanĝas ankaŭ papermonon.

S-o Raymond Duran, Sainte-Marie, Pyrénées Orientales (Francujo), deziras korespondi l. kaj pk. kun la Esperantistoj de la tuta mondo.

S-o Rich. Litzbach, Kantstr. 17, Breslau 25 (Germ.), interŝanĝas kaj vendas pm. moneretojn ktp. deziras korespondi kun ĉiuj landoj.

S-o Francisko Armuth, Kaposvár, Korona u. 14, (Hung.) interŝanĝas belajn kaj bonajn pm. Mi havas multajn belajn hungarajn pm.

Kun geinteligentuloj de la tuta mondo korespondas volonte per il. pk. kaj l. pri diversaj interesaj temoj: H. Pek, Moritzstr. 3/II/55, Wien VI, Aŭstrujo.

S-o Jaan Lõhmus, Valk, Tannenpergi i. 9, Estonio, deziras interŝanĝi pm. kontraŭ estonaj kaj latvaj kaj il. pk. k. ĉ. l.

Kiu sendos al mi 50—100 pm. de sia lando, ricevos saman kvanton de mia lando. Mi ankaŭ korespondas per il. pk. kun ĉiujlandaj samideanoj. Herm. Wollertz, Menzelen-O. Reinlando (Germ.).

Fraŭlo Tiberio Hajdu, Bauská Bystrica, Lazová 18 (Ĉeĥosl.) deziras korespondi per il. pk. (bfl.).

S-o Panšin S. M., ul. Liebknecht, Kinai (Tvera gubernio) Rusujo, Pedagogoj, deziras ricevi korespondi kun ĉiujlandaj samprofesioj kaj aliaj personoj, precipe per fermitaj leroj. Ne interŝanĝas bagatelajn.

S-o Maurice Ghidonescu, Str. Tabacari 81, București (Ruman.) deziras korespondi kun Esperantistoj kaj Esperantistoj de la tuta mondo.

Fraŭlo Artur Leffler, Luthersstr. 8 Weissenfels a. S. (Germ.) deziras korespondi kun la tuta mondo, prefere ekstereŝtaroj: same per stenografio, Gabelberger-Schramm.

S-o Richard Thml, instruisto, Kriesdorf A. T. E. (Ĉeĥosl.) deziras seriozan korespondadon kun gesamideanoj (ne komencantoj) el tuta mondo (esc. ĉ. Ĉ. k. Germ.) per pk. il. (bfl.) aŭ l. (temoj: popolkutimoj, Esp.-stenografio).

S-o Richard Hauber (20-jara) Ottostr. 1, Kaiserslautern (Germ.) deziras korespondi k. ĉ. l. per il. pk. Ankaŭ interŝanĝas pm. kaj papermonon. Mi sendas konstitucialeron kontraŭ l. sv. fk.

Fraŭlo direktanta mekanikisto, 20 jara, deziras korespondadon k. ĉ. l. per il. pk. kaj pm. kaj sciencajn librojn. Adreso-Antonio Carragulla, str. Conde del Asalto 170. pral. 4a 11, Barcelona (Hispanujo).

Fraŭlo Moritz Bengtsson, Hasveda (Svedujo), deziras korespondi Esp. kun la tuta mondo per il. pk. kaj l.

F-ino Anatoli Zdanok, Studencka 5, en Nieswież (Polujo) deziras korespondi kun la tuta mondo per il. pk., interŝanĝas pm. kaj papermonon.

Raj. samideanoj — legemuloj, kiuj deziras havi ĉiam fresan saĵ abundan legematerialon Esperantan, skribu al mi. Por respondo nepe aldonu pm. J. Sirjajev, Baklanka, gub. de Vologda (Rusujo).

S-o K. Matycha, Bydgoszcz, (Polujo), Łokietka 1 deziras interŝanĝi pk. il. k. ĉ. l. Tuj respondos!

Filatelistoj! Por 2 sv. fk. aŭ egala valoro mi sendas 50 div. maloftajn poŝtmarkojn de la liberŝtato Danzig. Interŝanĝas pm. Oskar Köhler, Olmsitz i. Vgl., Bergstr. 5.

Ruslandaj samideanoj atentu! Mi deziras korespondi kun samideanoj prefere el la regiono de Minsk aŭ Kiew pri ĉiu temo. Bonvolu skribi al Alfons Goppel, Altes Gymnasium, Regensburg, Bayern, Germanio.

Filatelistoj! Kun samideanoj de la tuta mondo mi interŝanĝas kelkajn mintojn de ĉeĥoslovakaj poŝtmarkoj. Sendu pm. de via lando al A. Raiborský, parfumejo. Přerov, Komenského 34, (Ĉeĥosl.).

Filatelistoj! Deziras interŝanĝi pm. 200—1000 p., ankaŭ papermonon k. ĉ. l., precipe Norvegujo, Britujo, Francujo, Finnlando, sendas hungarajn kaj turkajn pm. Hayas Michel 1923. S-o Augusto Kiss, Râșospalota, Orhaz utca 19 sz. (Hungarujo).

Jesús Paluzie, en Barcelona, estas devigita malakcepti la multnombrajn proponojn pri korespondado, kiujn li ricevas. Pardonu ĉiuj!

Filatelistoj atentu! Ĉiuj poŝtmarkoj de Danzig: malnovajn, novajn kaj aperantajn mi vendas malmultekoste. Ankaŭ ŝanĝas kontraŭ nur bona, maloftaj de ĉ. l. Kiu deponas iun sumon da mono, tiu ricevas ĉiam laŭlaŭcan kvanton da nove aperantaj pm. ĝis elĉerigo de l. sumo. Ankaŭ liveras germ. pm. maloftajn kaj provizorajn. Oni sendu nacian monbileton en rek. lero.

Garantio por akurata kaj kontentiga livero. H. Remers, Düsseldorf (Germanio), Luisenstrasse 97.

S-o Theod. Hörning, instruisto, Oberneuschönberg b. Olbernhau/Sa. (Germ.) deziras korespondi kun sam. profesioj el ĉ. l. pk. l. interŝanĝas Esperantajn.

F-ino Joséphine Orlens, studentino, 20 jara, Klapdor 16, Antwerpen (Belgiujo) deziras korespondi per il. pk.

S-o H. Van der Mast, Lange Van Ruysbroeckstr. 56, Antwerpen (Belgiujo) interŝanĝas pm. k. ĉ. l. Sendas tuj saman katalogvaloron en belgaj pm., laŭ katalogo Yvert 1924.

S-o Antoine De Villder, komercisto, Zele (Belgiujo) deziras korespondi kun gesamideanoj en la tuta mondo per il. pk.

S-o Georg Florentinski, Nieswież (Polujo), koj Studencka 56, deziras interŝanĝi pm. papermonon, il. pk. k. l.

F-ino Gerda Jörgensen, Osterstrade 12, Holback (Danujo) deziras korespondi per pk. il. k. ĉ. l.

S-o Jozefo Gyenge, impostoficejo, Timișoara (Ruman.), strato Telegrafului 27 deziras interŝanĝi pm. kun gesamideanoj de la tuta mondo, precipe kun turkoj, grekoj kaj italaj.

S-o Arthur Frieder, Cluj (Ruman.) Ledofabrike Renner, interŝanĝas pm. kaj papermonon k. ĉ. l.

Reveninte hejmen mi tuj respondas al miaj korespondantoj. Mi serĉas ankoraŭ aliajn poŝtmarkokolektantojn. Gabrielo Daly, Cluj (Rum.) Miles Kelmén 7.

S-o Andreo Felvinczy, Cluj, Str. Regina Maria 42, (Rum.) interŝanĝas pm. kaj papermonon k. ĉ. l.

Kontraŭ 100 alilandaj pm. samkvanton da rumana sendas Petro Frana, profesor, Cluj, Calea Victoriei 89. Precipe kontraŭ belgaj, nederlandaj kaj italaj.

S-o Samuele Szentkiralyi, direktoro de supera komerca lernejo, Cluj (Rumanujo), Școala Superioara Comerciala, deziras interŝanĝi pm. kun anglaj, francaj, italaj, hispanaj kaj balkan-stataj seriozaj kolektantoj.

S-o Jozefo Rêmes, razisto, Rové-Zámky (Ĉeĥosl.) deziras ŝanĝi naturdonaĵojn kaj fotografaĵojn il. pk. k. ĉ. l., precipe ekstereŝtaroj.

S-o Viktoro Badin, komercisto, Nové-Zámky (Ĉeĥosl.) deziras ŝanĝi por propagandaĵoj celoj il. pk. bfl. kolorajn l. e. popolitaj kaj urbobildoj kun la tuta mondo. Respondeas certe.

Kelkaj anoj kaj kursanoj de grupo E. R. A. deziras korespondi il. pk. Oni skribu al D-ro Karlo Körper en Nové Zámky (Ĉeĥosl.).